

# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

27a jarkolekto • n-ro 2 | **marto - aprilo 2022**

Mia patro certe povis paroli en la nederlanda kun mi, sed li ne faris tion.

Germana Esperanto-Kongreso en junio

Stuur een kaart of brief naar een euro-parlementariër!

Forpasis Vera Tuinder



Signoj de riĉeco 9

8 Revuo-interŝanĝo

12 Dokumentoj por la venonta jarkunveno

27 Studieweekenden in 2022


26 IFEF-kongreso en Ĉeĥio

# Fenikso, Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
**ISSN 1384-6515**

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando. La tarifo estas € 20,-.
Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version, aranĝitan de Rob Moerbeek. Petu abonon ĉe:
Redakcio@esperanto-nederland.nl.

**Kunlaborantoj de Fenikso:**
Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga
Redaktoro: Andries Hovinga
Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit
Konsilanto: Ineke Emmelkamp
Redakcio@esperanto-nederland.nl

**Limdato:**
Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 1-a de aprilo 2022.

**Informoj pri Esperanto:**
Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
(info@esperanto-nederland.nl)
tel. 050-5718842

**Studsemajnfino/studieweekend:**
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

**Esperanto Nederland enrete:**
Retejo: https://www.esperanto-nederland.nl
Fejsbuko: facebook.com/esperanto.nederland
Telegramo: https://t.me/EsperantoNederland
Tvitero: https://twitter.com/EsperantoNL

**Sendu viajn respondojn al:**
redakcio@esperanto-nederland.nl
Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.
La redakcio decidas ĉu publikigi tekstojn aŭ ne.

## Estraro

- **Estraro:** estraro@esperanto-nederland.nl

- **Prezidanto:** vakas, (prezidanto@esperanto-nederland.nl)
- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen (sekretario@esperanto-nederland.nl)
- **Kasisto:** Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, 2903 AC, Capelle a/d IJssel. (kasisto@esperanto-nederland.nl) tel.010 2133320
- **Estrarano:** Andries Hovinga, De Fennen 47, 8918 CC, Leeuwarden, tel.06 28916262 (andries.hovinga@esperanto-nederland.nl)

Nieuwe bestuursleden zijn welkom.
Novaj estraranoj estas bonvenaj.

- **Pri sociaj komunikiloj:** (sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)

- **Membro-administranto:** Koos Scharroo, Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord (membroj@esperanto-nederland.nl) tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero

**Bankkonto:**
IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
nome de Esperanto Nederland,
Capelle aan den IJssel.

**Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:**
Esperanto Nederland Ledenadministratie
Vaartweg 24G
8382 EB  Frederiksoord

# En tiu ĉi numero

4. De la estraro
5. Bonvenon
6. Mallongaĵoj
7. Lingvo-testeto
8. Revuo-interŝanĝo
10. Letero de Augustin Kakozwa de ANF
11. Silvia Pilger, vivo kiel denaskulo
12. Jarkunvenaj dokumentoj: Tagordo
13. Protokolo de la 30-a ĝenerala kunveno
14. Agadraporto 2021
21. BEMI-semajno en junio 2022
22. Nekrologoj de Vera Tuinder, Jaap Wieringa, Simo Milojević kaj Marian Nesse
24. Stuur een kaart of brief naar een euro-parlementariër
25. Vortserĉenigmo de Frank van Hertrooij
26. IFEF-kongreso 2022 en Ĉeĥa respubliko
27. Solvo de lingva testeto

## Amsterdama Rondo

"La Amsterdama Rondo" organizas kunvenojn de esperantistoj - ĉiun duan dimanĉon de la monato. Ni renkontiĝas per ZOOM. Ĉiuj estas bonvenaj.
Organizanto:
laamsterdamarondo@gmail.com
+31 614 240 870 (Peter)
+31 23 5242 643 (Bert)
Vidu: http://amsterdamo.nl

# Voorwoord

Ik weet niet hoe jij het ervaart, maar mij schijnt het toe dat we in een overgangssituatie zitten. Het is nu, op moment van schrijven, erg koud buiten, maar de krokussen kondigen de lente al aan. Het aantal coronabesmettingen loopt nog wekelijks op, maar toch worden de maatregelen versoepeld en mogen we elkaar weer meer in levenden lijve ontmoeten. Het kantoor van de UEA vertrekt uit Nederland.
Het lijkt een overgangssituatie te worden, waarbij iets van onszelf verwacht wordt. Welke keuzes gaan we maken? Gaan we naar het werk of blijven we voorlopig thuis werken? Op welke partij gaan we stemmen? Gaan we duurzaam investeren? Blijven we de UEA steunen? Gaan we naar de donderdagavonden, die TEJO in het Centra Oficejo in Rotterdam organiseert (zie laatste pagina)? Kunnen we samen Esperanto Nederland een booster geven?

Deze week las ik een brief van mijn werkgever dat we op moeten passen voor infiltratie, geen contact onderhouden met mensen die je niet kent. En ook las ik berichten van mede-esperantisten in Rusland die menen dat Amerikanen hen bedreigen. Ik hoop dat het gebruik van onze taal kan bijdragen aan het dialoog tussen mensen van verschillende landen. Dat zal niet altijd gemakkelijk zijn. Velen van ons hebben dat afgelopen tijd al ervaren in gesprekken met onze medelanders. Mensen kunnen heel verschillend naar dezelfde dingen kijken. Dat toont ook het verhaal dat Kees Ruig toestuurde, over de rijke jongeling die met zijn vader armoede ging bekijken. Misschien kunnen de woorden en het leven van Lidia Zamenhof en van de gestorvenen ons helpen en ons tot voorbeeld zijn.

Nog even iets praktisch om te noemen, voor iedereen die iets heeft toegestuurd. Vanwege de documenten voor de ledenvergadering hebben we in dit nummer nog niet alle bijdragen op kunnen nemen. Onze excuses daarvoor. Deze zullen in het hierop volgende nummer of nummers worden gepubliceerd.

We wensen jullie veel leesplezier.

*Foppe-Klaas Hovinga*
*Hoofdredacteur*

# Foto sur la kovrilo

Silvia Pilger kreskis en Esperanta familio kaj kun sia patro ŝi parolis nur Esperanton. "Unu persono unu lingvo!", estis la moto. En la urbo kie Silvia loĝis, tio estis stranga, sed en la Esperanto-mondo ŝi ne estis esceptulo. En ĉi tiu numero kaj la sekva numero de Fenikso Silvia rakontas sian historion. Ŝi komencas la rakonton parolante pri siaj pragepatroj kaj gepatroj.

# De la estraro

**Informoj pri jarkunvenoj 2021 kaj 2022, raportoj, kotizoj, kultura tago, Germana Esperanto-Kongreso.**

**Estraro**
La estraro kunvenis la 22-an de januaro. Estis la unua kunveno de 2022! Certe sekvos pluraj aliaj. La venonta okazos la 5-an de marto.

**Jarkunveno 2022**
Dum tiu estrara kunsido ni detale priparolis nian jarkunvenon kiu okazos la 21-an de majo en la ejo Floor en Lunteren. La tagordon vi trovos sur paĝo 12 en tiu ĉi Fenikso. Espereble ni aldonos kelkajn nomojn por kandidatoj al la estraro. Dum la posttagmeza programo Leston Buell prezentos atelieron pri artaĵoj. Agrabla programero post la kunsido. Vi ĉiuj estas bonvenaj!

**Jarraporto**
La jaro 2021 estis speciala, stranga, teda jaro. Kiam mi komencis verki la jarraporton pri 2021 mi pensis ke eble ĉi-foje la raporto estas mallonga. Sed ne, tamen aktivecoj okazis. Rob Groeneveld verkis la raporton pri la jarkunveno en 2021. Pardonpeton al Foppe-Klaas, kiu nun ne havas tiom da loko por aliaj artikoloj.

**Estraranoj**
Post la jarkunveno en 2011 kelkaj membroj decidis kunveni kun la celo trovi solvon por la manko de estraranoj. Ili kelkfoje Zoom-kunvenis. La grupanoj telefonis al pluraj membroj por sondi iliajn opiniojn por akcepti taskon en la estraro. Ĉu vi interesiĝas sed neniu kontaktis vin? Ne gravas, vi povas mem prezenti vin ĉe la sekretario!

**Vojaĝoj**
En la somero tre verŝajne okazos kultura tago en bela kaj historia vilaĝo. Triopo pretas aranĝi ĝin. Atente sekvu la novaĵojn en Fenikso, la retejo kaj Facebook.

Espereble en 2022 ni povas vojaĝi al alilandaj renkontiĝoj. Proksime de Nederlando okazos la **Germana Esperanto-Kongreso**. Estas interesa programo. Kvar membroj de Esperanto Nederland prelegos. Kajto prizorgos koncerton en Esperanto kaj la frisa lingvo. Ĉu vi memoras Feri Floro?
Li kantis dum NEJ-aranĝoj kaj nun en Oldenburg! La tutan programon vi trovos en la retejo:
https://www.esperanto.de/eo/gek2022

**Kotizo**
Ĉu vi jam pagis vian kotizon por la jaro 2022? La kotizo estas €35,-, samdomanoj pagas € 12,50 kaj membroj de NEJ pagas € 15,-.
La konto de Esperanto Nederland estas:
NL10 TRIO 0786 8441 67, Esperanto Nederland, Capelle aan den IJssel, menciu: kotizo 2022.

**Estrarkunsidoj**
Membroj kiuj interesiĝas pri la laboro en la estraro aŭ tiuj kiuj volas aŭdi pri kio ni parolos, povas ĉeesti estrarkunsidojn post anonco ĉe la sekretario.

**Demandoj**
Ĉu vi havas demandojn al la estraro? Kontaktu min.

*Ineke Emmelkamp, sekretario*
*sekretario@esperanto-nederland.nl*

# Vakcinoj por ĉiuj

**Iru Doni Unu!**
ALVOKO donaci por vakcinoj



Kara leganto,
En pli bonhavaj landoj ni ricevas jam trian reimunigan vakcinon kontraŭ la pandemia KOVIM-19, dum en pluraj landoj eĉ la unua ne estas atingebla. Por ekvilibrigo Monda Organizaĵo pri Sano (MOS)(World Health Organization, WHO) alvokas donaci: eĉ 5 dolaroj ebligas vakcini, ĝi kalkulis.

Ni konscias, ke nenio devigas partopreni, sed se esperantistoj sentas solidarecon kun la samsortanoj, jen ŝanco konkretigi tiun emon.
Pro la informo ni dankas la prezidanton de nia medicina faka asocio UMEA, d-ro Christof Klawe, kiu disponigis sian "Prezidantan Bultenon", n-ron 15 de decembro 2021.

Ĝi finiĝas per la alvoko de MOS: Iru al la retejo https://gogiveone.org, alklaku 'donate'(donacu). Vi povas pagi per kreditkarto. La retejo estas en la angla lingvo.

*Rob Moerbeek / Nederlando*

# Bonvenon!

In 2021 werden 22 mensen lid van onze vereniging! Hoeveel worden er dit jaar? Als ieder lid een nieuw lid weet te werven, dan hebben we zeker een record!

Eind 2021 meldde Reinier de Bruin uit Zwolle zich als lid aan. Hij bestelde meteen ook enkele boeken waaronder een grammaticaboek!

Begin 2022 begon goed. Drie nieuwe leden: Monique Theuns uit Geldrop, Ton Olgers uit Amstelveen, en iemand uit Noord-Nederland. En er is ook al een aanmelding voor het studieweekeinde. Leuk om dan kennis te maken.

Nieuwe leden krijgen bij hun aanmelding ook het aanbod om gratis het Grammaticaboek van Haveman/de Vries te bestellen. Ook andere leden kunnen bij mij zo'n boek bestellen. Er is nog voorraad.

Alle vier van harte welkom!

*Ineke Emmelkamp,*
*Sekretario Esperanto Nederland*
*sekretario@esperanto-nederland.nl*

**Over het boek:**
"Esperanto, Grammatica met Oefeningen"
ISBN: 9789062831449
Prijs bij Bol.com: € 64,90
Prijs bij UEA: € 30,00
Voor nieuwe leden gratis.




## Reago de leganto

### Herinnering aan Holland


**Retmesaĝo de Anneke Schouten-Buys pri la poemo de Hendrik Marsman, tradukita de Karina Scharff.**
Estis interese, legi la tradukon de "Herinnering aan Holland."
Laŭ mi "Vicoj neimageblaj / delikataj poploj" devus esti:
"Vicoj neimageble / delikataj poploj.
Korajn salutojn, Anneke

**Respondo de Karina Scharff:**
Jes dankon, estas bona komento.
Saluton Anneke, mi ne konas vin, ĉu eble vi interesiĝas pri korektado de aliaj poemoj?
Korajn salutojn, Karina

## Krucvortenigmo

La solvo de la lasta krucvortenigmo estis: **Vintrodormado**
Ni ricevis la ĝustan solvon de la jenaj personoj: Frans Reibestein- v.d. Does kaj Frank Hoens. Gratulon, ke vi solvis ĝin.


Ĉi-foje ne estas krucvortenigmo.



## Wordle - Vortjo - Wortleo

*Retmesaĝo de Frans Reibestein-v.d. Does:*


Mi denove legis en Onze Taal agrablan sciigon:
>> Wordle bestaat in het **Esperanto**, Portugees, Spaans en Zweeds




**Respondo**
Dankon pro bona konsileto. Mi ne konis Wordle, sed mi konas la ludon Lingo, kaj ĝi estas preskaŭ la sama, krom ke ĉe Wordle oni ne ricevas la unuan vorton.

Krom la paĝo https://vortjo.net mi trovis ankaŭ la ludon sur paĝo: https://esperanto.cat/wordleo.
Ĝi estas iomete kondiĉiga ludo, sed bona por lerni novajn vortojn en Esperanto. Robin van der Vliet kreis vortjo.net.

## Tito Brandsma estos enkanonigita




La 25-an de novembro 2022, papo Francisko rekonis miraklon atribuitan al la propeto de beata Tito Brandsma. Ĉi tiu rekono estis la lasta paŝo postulata por kanonigo: restas nun nur determini kiam Tito Brandsma estos enkanonigita. La celata miraklo estas la resaniĝo de la usona pastro Michael Driscoll, kiu en 2004 suferis de grava formo de kancero. Post venado en kontakto kun fragmento de la froko de Brandsma, li resaniĝis. Kuracistoj ne povis medicine klarigi ĉi tiun kuracon. Titus Brandsma (la 23-an de februaro 1881 - la 26-an de julio 1942) estis karmelano de Frislando kaj profesoro pri filozofio kaj mistikismo. Li ankaŭ estis esperantisto. Li estis murdita en Dachau pro lia rezisto al la nazi-reĝimo.

*Fonto: KN, 25-11-2021*
(https://mallonge.net/2202tbrandsma)

### Paska preĝo

Deziru pacon al Jerusalem;
Bonan staton havu viaj amantoj.
Paco estu inter viaj muroj,
Bonstato en viaj palacoj.
Pro miaj fratoj kaj amikoj mi do diru:
Paco estu al vi.
Pro la domo de la Eternulo, nia Dio,
Mi deziras al vi bonon.
*La Sankta Biblio 1926, Psalmaro 122, 6 - 9*

## Songfestival 2022 met Nederlandstalig liedje



Laatste nieuws: op het songfestival 2022 wordt Nederland vertegenwoordigd door S10 met een Nederlandstalig liedje! In de jaren 90 werd voor het eerst in het Engels gezongen. We – NEJ-leden – stonden voor de ingang om folders uit te delen in het belang van een Nederlandstalig liedje! Op de folder stond een korte zin vertaald in alle talen van Europa! Ik weet niet, ergens moet ik de tekst nog wel hebben. Misschien voor de volgende Fenikso.

Op dinsdag 10 mei en donderdag 12 mei vinden de halve finales plaats; op zaterdag 14 mei de finale.

*Ineke Emmelkamp*

# Laŭdu

*De s-ro Frans Cobben*



Mi laŭdu la utilan artikolon pri Clemens J Setz en paĝo 22. Vi transdonu mian aman dankon al s-ino Benata Hengstmengel-Koopmans por la kleriga revuo-interŝanĝo.

**Ni rimarku akre la doktoran histrionon**

lernu la belon en heloto,
konu bonegon en gnometo,
sciu ĉikanon en guruo,
vidu saĝon en histriono,
sentu amon en Ksantipino!

*Frans Cobben*

histriono = komediant
heloto = heloot
ĉikano = vitterij, muggezifterij

# Lingva testeto

Tiu ĉi testeto konsistas el du demandoj. Ĉu vi scias la ĝustajn respondojn?

1) Enmetu la ĝustan vorton en jenan frazon: Baldaŭ estos Pasko, kaj ni ĉeestos prezentadon de la Mateo-... de Johano Sebastiano Bach.
a. Pasio
b. Pasiaĵo
c. Pasiono

2) En kiu el la ĉi-subaj frazoj la adverbo (E-vorto) devas esti adjektivo (A-vorto)?
a. Estas grave ke ni tuj informu la kongresanojn pri la programŝanĝo.
b. Ŝi infektiĝis de la kronviruso kaj iĝis grave malsana.
c. Ĉu vi opinias amon plej grave en la vivo?

Vi povas trovi la respondojn al la testo sur paĝo **27**.

*Arjen-Sjoerd de Vries*

# PREĜO DE LA ARBO

Anonima

Vi, kiu preterpasante levas vian brakon kontraŭ mi antaŭ ol kaŭzi ian difekton, observu min bone.
Mi estas varmo en via hejmo dum la longaj kaj malvarmaj noktoj de la vintro. Mi estas amika ombro, kiu protektas vin kontraŭ ardantaj sunradioj de la somero. Miaj fruktoj satigas vian malsaton kaj kvietigas vian soifon. Mi estas la trabo, kiu subtenas vian domtegmenton, tabulo por via tablo, lito sur kiu vi ripozas kaj dormas. Mi estas tenilo por viaj laboriloj, kaj la pordo de via domo. Kiam vi naskiĝis, mi liveris lignon por via lulilo; kiam vi mortos, ankoraŭ mi, kiel ĉerko, akompanos vin en la sinon de la tero. Mi estas fonto de boneco kaj floro de beleco. Se vi amas min kiel mi meritas, defendu min kontraŭ malprudentuloj. Respektigu min: Mi estas la arbo.



*El: Komunikoj, Trimonata bulteno de spiritisma eldona asocio f. V. Lorenz, Brazilo, oktobro-novembro-decembro 2021 n-ro 184*




# Revuo-interŝanĝo

## Benata Hengstmengel-Koopmans

**Revuo-interŝanĝo estas projekto por legi pliajn revuojn. Pro tio nia revuo Fenikso estas regule sendata al alilandaj redakcioj kun la espero ricevi ties eldonaĵojn. Kiam leganto ŝatas havi ricevitan revuon aŭ artikolon el ĝi, bonvolu kontakti min pere de retadreso benata@zonnet.nl.**

**La Bulteneto, jaro 2021 n-ro 64; Dulingva Magazino, eldonata en Vieno, Aŭstrio**
La Bulteneto mencias Ekspozicion 'Pri la arto de la 1980-aj jaroj' en la muzeo Albertina Modern en Vieno (nova muzeo por moderna arto). Kun biografioj pri diversaj artistoj kaj multaj fotoj de objektoj artaj.

**Norvega Esperantisto, 3a periodo 88a (97a) jaro, 5-6/2021**
Sur la frontpaĝo videblas foto de Kristoffer Robin Haug kun komuniko: 'esperantisto en la parlamento'. Sur paĝo 5 aperas intervjuo kun la novelektito, kiu nur restos 3 monatojn en la parlamento (por la Verduloj), ĉar li anstataŭas la konstantan reprezentanton pro foresto. Tre praktike (ankaŭ por via recenzantino!) estas la mencio de multaj aliaj Esperanto-revuoj (kun nomoj, prezoj, k.t.p.).



**La Kancerkliniko, oktobro/novembro/decembro 2021, n-ro 180; Politika, Kultura, Skandalema, Ajnista**




Foto sur la frontpaĝo de Talibano sub la teksto: 'La Taliban-anoj daŭre estas la samaj!'
Kolumno de Ĵak le Puil 'La Kuracservo'.
Artikolo de Laŭrenco Septier pri Lasta verko de Christo kaj Jeanne-Claude: 'Triumfa Arko en Parizo', kun diversaj fotoj de enpakitaj objektoj.
Ĉe la sekvonta artikolo (de Serĝo Sir) aperas bildo kun la teksto 'Tio ne estas verko de Christo sur la vorko de Eiffel'. [Rimarko: vorko signifas 'grava konstruaĵo'.]

**Suplemento ĉe La Kancerkliniko n-ro 180: 'Ĉe la ciganinoj' de Mircea Eliade, el la rumana tradukis Ionel Oneţ [la konata libroservisto de UEA]**
Sur la kovrilpaĝo foto de 'La tri Gracioj' de Rafaelo el la 16-a jarcento. Temas pri interesa rakonto 19-paĝa, kiu aperas okaze de la 40-jariĝo de la esperantistiĝo de la tradukinto. [korajn gratulojn al Ionel Oneţ, ankaŭ al Rob Moerbeek kiu kontrollegis!]

**La Revuo Orienta, oktobro n-ro 10 2021 kaj novembro n-ro 11 2021, 102-a jaro**
Japanlingva revuo kun esperantaj tradukoj aŭ nur resumoj!
Oktobro: Kelkaj raportoj pri la 2-a Virtuala Kongreso de 2021 kaj pri la samjara virtuala IJK.
Novembro: Raporto pri la 108-a Japana Esperanto-Kongreso kaj artikolo pri Fenikso, (blinda amiko de Ella, la reprezentanto de tiu ĉi rubriko), kiu faris hejmpaĝon de Korea Asocio de Blindaj Esperantistoj.

**Sennacieca Revuo, n-ro 149, decembro 2021; eldonaĵo de la 100-jara Sennacieca Asocio Tutmonda [www.satesperanto.org]**
Speciale interesaj estas la paĝoj 39-55 kun 'Dialogoj de la Dioj – Scenoj de Luciano el Samosato' tradukitaj de nia membro Gerrit Berveling.

**Aŭstraliaj Esperantistoj 564**
Temas pri 5-paĝa novaĵletero kun diversaj temoj. Enhavas leteron de la 104-jara Marcel Leereveld, kiu naskiĝis en Amsterdamo kaj rakontas pri sia longa vivo.
Ĉi tiun numeron 564 sendis Det Koning, kiu pretas sendi ekzempleron al interesitoj [kontaktu benata@zonnet.nl].

**Dia Regno, numeroj 5 kaj 6 2021; du-monata kristana revuo en Esperanto**
Numero 5: Foto de la kongresanoj dum la kristana kongreso en Legnica (Pollando) sur la frontpaĝo.

Kun kongresa raporto pri la 70-a KELI-kongreso, interesaj prelegoj kaj multaj fotoj. La kongreso okazis ĉeeste kun protestantaj kaj katolikaj gefratoj de 7-14 aŭgusto 2021.
Aperas ankaŭ artikolo pri la vivo de Dag Hammarskjőld (1905-1961). Li estis Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj de 1953-1961.
Numero 6: Temas pri Kristnasko, numero kun kantoj.

**Muziko de via anim'**
https://youtu.be/60QfXT4g3AM.
De Gerrit Berveling alvenis ĉi tiu ligilo.
Aŭskultu la kantistinojn Grinoalda kaj Maria Ávila kaj spektu ĉe la bildoj la kantitajn tekstojn.



# Invito al 45-a SEFT 2022

**Germana Esperanto-Asocio**
**Esperanto-Societo Neubrandenburg**
Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro

| | |
|---|---|
| Tempo: | De la **9-a ĝis 17-a de julio 2022** |
| Ĉefa slogano: | “nur okazos tio, kion vi organizos por la aliaj” viajn programideojn vi metu sur la publikan tabulon por informi kaj varbi. |
| Loko: | Tendejo "Campingplatz am Dreetzsee" Thomsdorf, regiono de urbeto Feldberg Meklenburgio/Antaŭpomerio |
| Kondiĉoj: | Memprizorgado (tendo, manĝoj, tendeja programo), surloke oni povas lui kabanojn, kontaktu skribe aŭ telefone la tendejan oficejon |
| Ideo de SEFT: | Komuna tendumado, uzante kaj lude instruante la lingvon Esperanto al familianoj kaj amikoj de mateno ĝis nokto |
| Programo: | Migradoj tra la naturo, ekskursoj, kafoklaĉoj kaj vesperaj kunvenoj, prelegoj, ĉiu-vesperaj fabelhoroj, banado en diversaj puraj lagoj ktp. (eblas bani sin nude aŭ vestite en la tuta regiono). |




Jen la adreso por aliĝi, tie ankaŭ eblas mendi kabanojn:
"Campingplatz am Dreetzs"
Am Dreetzsee 1, OT Thomsdorf
17268 Boitzenburger Land

telefono: 039889 / 746, retpoŝto: dreetzseecamping@t-online.de
Plurajn informojn vi trovas sub: www.esperanto-nb.de

# Signoj de riĉeco


*Araba parabolo pri vera riĉeco.*

Araba parabolo pri vera riĉeco.
Bonhava patro penas instrui sian filon pri la diferenco inter riĉeco kaj malriĉeco. Tial li iras kun la filo al farmbieneto kie la gefarmistoj apenaŭ sukcesas vivi. Ili loĝis tie kelkajn tagojn kaj spertis la tiean povrecon. Kiam post kelkaj tagoj patro kaj filo reveturis al sia bienego, la patro demandis al sia filo: “Kion vi opinias pri la pasintaj tagoj?”
“Kia grandega sperto”, diris la filo.
Ĉu vi nun vidis kiom malriĉaj homoj povas esti?” lia patro demandis. “Jes, mi multon lernis” respondis la filo. “Mi vidis ke ili havas kvar hundojn, kvankam ni havas nur unu. Mi vidis plaŭdetantan rivereton kiu trafluas ilian tutan terpecon, kie ni havas lageton kun kelkmetra diametro. Ni uzas lampojn, kaj ili povas rigardi la stelojn ĉiunokte. Ni konstruis murojn kaj kradojn ĉirkaŭ nia bieno por nin protekti, kie ili havas geamikojn por protekti unu la alian. Ni havas geservistojn kiuj prizorgas nin, kiam ili kiel najbaroj prizorgas unu la alian. Dankon ke vi montris al mi kiel malriĉaj ni fakte estas”.

*Tradukita de Kees Ruig*
*Transprenita el la Maldena revuo Topic, vintra eldono.*



*Foto: Canva*



*Fonto: UEA*

# ANF/Dua trimestro

*De Augustin Kakozwa, januaro 2022*



*Foto: El filmo de antaŭ unu jaro. https://mallonge.net/222ANF*

Saluton gekaraj,

Ni, anoj de la Asocio Nova Familio, estas tre dankemaj kaj ĝojaj pro la fakto ke vi senĉese helpadas al ni, kaj tio ebligas ke niaj prizorgataj georfoj vizitu la lernejon. Antaŭ monatoj ni estis petintaj monhelpon ĝis fino de decembro 2021 por pagi la lernejajn kotizojn de la unua trimestro. Tio bedaŭrinde ne eblis kaj ni ne povis atingi nian celon. Feliĉe, en januaro 2022 multaj donacadis laŭ sia eblo, tial ni sukcesis pagi iliajn lernejajn kotizojn de la UNUA trimestro.

Post la pagoj de la unua trimestro, ni nun denove bezonas helpon: Ni devas nun pagi por la dua trimestro:
Ĉar en nia lando ne estas stabilaj prezoj, oni bedaŭrinde denove plialtigis la kotizojn de la lernejaj pagoj ĉe la mezaj lernejoj. Tial ni sciigas al vi ke post la kalkulado anstataŭ 13110$ kiujn ni petis antaŭe por ĉiuj, ni nun bezonas kaj petas 14000$.
Ek de januaro ĝis fino de aprilo ni bezonos tiun sumon. Do ni petas al vi pludoni nian peton kaj la informojn pri ANF kaj niaj georfoj al multaj homoj kaj grupoj; donacu mem laŭ via eblo. La nepagado de la kotizoj kaŭzas forpeladojn de la gelernantoj el la kursoj kaj ekzamenoj, tiel ili maltrafos kaj reprenos la saman klason venontjare.
Ni alkroĉas la rezultojn de kelkaj prizorgataj georfoj niaj, akiritaj en la ekzamenoj de la unua trimestro. Tio eblis danke al vi, ĉar vi subtenas nian ANF.
Gekaraj, raportante al vi, ni prezentadas al vi niajn projektojn kiel ekzemple konstrui orfejon, por ke ili ĉiuj vivu kune en ĝi, por ke ili estu pli sekuraj en ĉi tiu malsekura vivmedio.
Jen hodiaŭ kun larmoj en niaj okuloj ni raportas al vi, ke unu el niaj prizorgataj knabetinoj perdiĝis antaŭ semajnoj, kaj ĝis nun ne reaperis.
Ni petas kaj tre esperas ke eble ĉiu de vi bonvolos pripensi la aferon, por ke ni finfine trovu eblojn: ĉu fondaĵon ĉu alian organizon por financi la gravegajn kaj urĝajn projektojn niajn.

*Por ANF, Augustin Kakozwa kaj Betti Maul*

*Iom pli da informoj pri Asocio Nova Familio: https://www.esperanto.de/eo/asocio-nova-familio-eo*

# Vivo kiel denaskulo

**Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland Silvia Pilger rakontis pri sia vivo kiel denaskulo en Esperanta familio en Nederlando.**

Silvia Pilger estas filino de Wouter Pilger kaj Janina Pilger Bugaj, du esperantistoj kiuj renkontis unu la alian dum junularo kongreso de Esperanto en Hungario en 1966.

**La avo kaj avino**
Silvia: 'La historio de mia avo kaj avino estis kiel Romeo kaj Julieto, kiuj amis unu la alian.' La avo estis filo de sufiĉe riĉaj amsterdamanoj kaj loĝis en tia bela domo ĉe kanaloj. La avino loĝis en malpli bona familio. Ili rapide lernis Esperanton kaj skribis leteretojn malgrandajn en Esperanto, sed post kiam ili geedziĝis ili neniam plu uzis Esperanton. Sed tiu Esperanto estis ilia komuna lingvo de ilia amo.

**La patro**
Silvia: 'Kiam mia patro estis dek-ses-jaraĝa, li en subtegmento trovis keston kun libretoj kaj lernis Esperanton. Mi ne scias, ĉu vere estas kiel li rakontis al mi, sed li diris: "Tiu lingvo estis tiom facila, ke post du, tri semajnoj mi iris al junulara kunveno en Germanio kaj mi povis paroli tuj kun ĉiuj esperantistoj, kiuj tie estis kaj tio tiom ege plaĉis al mi, ke Esperanto estas tiel facila lingvo por lerni, sed ankaŭ tiom bona lingvo por ekkoni aliajn homojn el la tuta mondo." Do mia patro estis tre ĝoja, ke li trovis tiujn libretojn.'




La patro vizitis diversajn junularajn kongresojn. Li estis tute juna kaj li ankaŭ tradukis kaj skribis diversajn kantojn en Esperanto kaj Silvia trovis iun bendon kun kantoj: "*Duo Espera – Jen Nia Mondo, (Kantas Dylan kaj Seeger)*", tradukitaj de sia patro. 'Tre belaj kantoj.' En la jaro '66 li veturis al la Hungara Junulara Kongreso en Hungario.

**La patrino**
La patrino de Silvia naskiĝis en 1946 en Pollando. Ŝi vivis en komunista lando, do ne havis eblojn lerni lingvojn tiel kiel ŝia patro, ĉar oni ne instruis tiom da lingvoj en la lernejo, krom la rusan, kiu estis deviga. 'Mia patrino ege volis lerni lingvojn. Ŝi tute ne estis tre interesita pri Esperanto, sed Esperanto estis lingvo, kiun ŝi rajtis lerni kaj ŝi trovis tre bonan klubon, kie ankaŭ estis plaĉaj homoj kaj ili estis esperantistoj. Do mia patrino lernis la lingvon. Ŝi ankaŭ veturis al tiu Hungara Junulara Kongreso kaj tie ŝi renkontis mian patron.'


*Kristnasko kun gepatroj kaj frato*

**La patro kaj patrino**
Silvia: 'Mi trovis multajn leterojn en Esperanto, kiujn ili verkis unu por la alia dum multaj jaroj.' Ili renkontiĝis en 1966 kaj en 1970 la patro laboris en Danlando kaj la patrino ricevis permeson por veturi kaj viziti lin. Ili geedziĝis kaj en la jaro 1971 la patrino ricevis permeson por veturi el Pollando al Nederlando. Silvia: 'Vi tute ne plu povas imagi kiom longe oni devis atendi por ricevi permeson por elveturi Pollandon por viziti alian landon kaj ekloĝi en alia lando. Tio estis tiom malfacila afero.' Tiutempe estis malfacilege en Nederlando trovi loĝlokon, do ili ekloĝis en Lelystad, kie oni konstruis multajn novajn loĝejojn. Silvia: 'Estis tute stranga urbo por komenci vivon.'

**La infaneco**
Silvia: 'En la jaro '72 mi naskiĝis. En kiu lingvo paroli al tiu infano? Ili tre rapide sciis, ke mia patrino parolu pole. Tio estis ŝia lingvo. Kaj miaj gepatroj havis komunan lingvon, Esperanto. Ili volis daŭrigi tion kaj mia patro certe volis, ke liaj infanoj estu denaskaj esperantistoj. Do mi tute ne memoras ion ajn pri stranga multlingva familio. Por mi ĉi ĉio estis tute normala. Miaj gepatroj uzis la principon de unu persono unu lingvo. Mia patro certe povis paroli en la nederlanda kun mi, sed li ne faris tion. Li ĉiam parolis al mi en Esperanto. Mi ankaŭ ne rajtis paroli en alia lingvo. Mi ne povis krokodili en nederlanda al mia patro, sed mi ankaŭ tute ne volis tion, ĉar por mi estis tute natura, ke mi parolu Esperanton. Kaj kun mia patrino ĉiam en pola, ĉiam.'
*La dua parto sekvos en la venonta numero.*

# TAGORDO

## TAGORDO por la 31-a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland,

**okazonta la 21-an de majo 2022 - de 10:30 ĝis 13:00, en la ejo Floor, Dorpsstraat 36, 6741 AL Lunteren**

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto antaŭ la malfermo de la kunveno.

**Alveno** ekde 10:00

**1. Malfermo** de la ĝenerala kunveno je 10:30.
Rememoro de forpasintaj membroj.
Nomumo de du personoj por la kalkulado de la voĉdonoj.

**2. Fikso** de la cetera tagordo.

**3. Protokolo de la 30-a ĝenerala kunveno en 2021**

**4. Agadraporto pri 2021**

**5. Financaj raportoj pri 2021**
**5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono.**
**5.2. Rezultkonto pri 2021 kun klarigoj**
**5.3. Bilanco je 31-12-2021**

**6. Proponoj**
**6.1. Propono de la estraro:** fikso de la kotizoj por 2023. La estraro proponas ne sanĝi la kotizojn.
**6.2. Buĝeto kaj laborplano 2023**
**6.3. Plano por informado**

**7. Elektoj**
**7.1. Arbitracia komisiono**
Anneke Schouten-Buijs estas membro de la komisiono, ĝis 2022. Ŝi estas reelektebla por nova tri-jara periodo. La aliaj du membroj estas: Johan Swenker (2020-2023) kaj Marc van Oostendorp (2020-2023)

**7.2 Estraro**
**7.2.1** Elekto de prezidanto. Nova prezidanto estas serĉata.
**7.2.2** Elekto de kasisto.
La nuna kasisto Loes Demmendaal, estas reelektebla. Estas ŝia tria periodo. Unue la membrokunveno devas doni konsenton ke ŝi estas reelektebla por la tria periodo. Post tiu konsento ni elektos la kandidaton.

**7.2.3** la estrarano Andries Hovinga demisias kaj ne estas reelektebla.
**7.2.4** Elekto de aliaj estraranoj. Kandidatoj estas serĉataj.
- - Peter van Noorden kandidatas por la estraro.

**7.3. Kaskontrol-komisiono**
La kaskontrolkomisionanoj por la jaro 2021 estas Simon Smits kaj Ronaldo Nobel. Rezerva membro estas Peter van Noorden. Por la jaro 2022 restos Ronaldo Nobel, plia membro kaj rezerva membro estas serĉataj.

**7.4 Komitatano A ĉe UEA.** Kandidato estas serĉata.

**08. Fenikso**
La redaktoro Foppe-Klaas Hovinga, informas nin pri la redaktado kaj presado de Fenikso.

**09. Informado pri diversaj temoj:**
**9.1 Germana Esperanto-Kongreso**, okazos en junio 2022 en Oldenburg/Germanio. Esperanto Nederland kunlaboras en tiu ĉi kongreso; oni ricevis subvencion kadre de Erasmus+-programo de EU.
**9.2. Kultura tago**
**9.3. Eventuale informado pri aliaj temoj**

**10. Jubileantoj**
Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran membrecon. Mencio de la membroj, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio

**11. Verloren van Themaat-premio.** La ĵurio anoncas la rezulton pri la jaro 2021.

**12. Ronddemando.**

**13. Fermo**

*Ineke Emmelkamp, sekretario*
*Groningen, la 28-an de januaro 2022*

**== Provizora versio ==**
La membroj voĉdonas pri ĝi en la 31-a kunveno.

# Protokolo de la 30a ĝenerala kunveno
## de Esperanto Nederland

| | |
|---|---|
| *Dato:* | *la 16-a de oktobro 2021.* |
| *Loko:* | *Partycentrum Floor, Dorpsstraat 36, 6741 AL Lunteren.* |
| *Tempo planita:* | *de 10:30 ĝis 13:00.* |
| *Ĉeestis la estraro:* | *Ineke Emmelkamp, sekretario, Loes Demmendaal, kasisto, Rob Moerbeek, estrarano pri instruado, kaj Andries Hovinga, estrarano.* |
| *Ĉeestis:* | *entute 20 membroj (inkluzive la estraron).* |
| *Prezidis:* | *Hiddo Velsink.* |
| *Protokolis:* | *Rob Groeneveld.* |

1. **Malfermo de la ĝenerala kunveno**
   - La kunveno estis malfermita je 10:35.
   - La prezidanto prezentis la estraranojn.
   - La ĉeestantoj ekstaris kaj honoris la forpasintajn membrojn dum momento da silento: S-ro Fer Polder, s-ro Willem van Leenhoff, s-ino Mila van der Horst-Kolinska, s-ino Jen Verheijen, s-ro Eric Korver, s-ro Hans Erasmus, s-ino Trien Molenaar-Heyne, s-ro Theo Koops, s-ino Stella de Weerd, s-ino Nelly Overwater, s-ro Hylke Bron, s-ro Bob Venhuizen, s-ino Joke Hoobroeckx-Dooren, s-ino Carla van den Bos, s-ro Remment Balk.
   - La voĉdonadon kalkulos Ronaldo Nobel kaj Arjen-Sjoerd de Vries.
   - Neniu el la ĉeestantoj kontraŭis ke ria foto aperu en Fenikso.

2. **Fikso de la cetera tagordo**
   La tagordo estis akceptita.

3. **Protokolo de la 28-a ĝenerala kunveno en 2019**
   La protokolo estis aprobita.

4. **Agadraporto pri 2019**
   Punkto 2.3: la ĝenerala kunveno ne okazis en 2018 sed en 2019.
   La agadraporto estis aprobita.

5. **Financaj raportoj pri 2019**
   ***5.1.Raporto de la kaskontrol-komisiono***
   La raporto de la komisiono konsistanta el Ronaldo Nobel kaj Simon Smits estis pozitiva: la financaj raportoj estas en ordo.
   ***5.2.Rezultkonto pri 2019 kun klarigoj***
   ***5.3.Bilanco 31-12-2019 kun klarigoj***
   La financaj raportoj estis aprobitaj.

6. **Proponoj**
   ***6.1.Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2021. La estraro proponas ne ŝanĝi la kotizojn***
   La kotizoj restos senŝanĝaj.
   ***6.2.Buĝeto kaj Laborplano pri 2020***
   La buĝeto kaj laborplano estis aprobitaj.
   ***6.3.Buĝeto kaj Laborplano pri 2021***
   La buĝeto kaj laborplano estis aprobitaj.
   ***6.4.Ŝanĝoj en la Huishoudelijk Reglement***
   Ekestis diskuto pri hibrida membrokunveno, t.e., kaj reta kaj ĉeesta, kun la eblo voĉdoni. Rob Groeneveld diris ke jam ekzistas leĝo kiu ebligas virtualajn membrokunvenojn: "Tijdelijke wet COVID-19 Justitie en Veiligheid, artikel 6". Joost rimarkis ke Zoom havas eblon por voĉdoni sekrete. La estraro preparos proponon por eventuale havi virtualan aŭ hibridan venontan jarkunvenon, kaj ankaŭ kiel aranĝi 'normalan' membrokunvenon kun pluraj membroj kiuj ne povas fizike ĉeesti.
   Okazis diskuto pri la libroservo de Esperanto Nederland kiu laŭ la regularo estas ĉe UEA. Dum la sekva jarkunveno ĉi tiu temo estos priparolita, ĉar la libroservo de UEA probable translokiĝos.
   Demando de Peter E.: ĉu la donacantoj havas la rajton paroli dum kunvenoj? Respondo: ne aŭtomate.
   Demandoj: ĉu la tempolimo de dujara membreco por reprezentontoj de Esperanto Nederland estas tro longa aŭ eĉ tro mallonga? (artikolo 27).
   Respondo de la estraro: du jaroj estas minimuma periodo.
   La ŝanĝoj estis akceptitaj.

   **6.5 Priparolado kaj akcepto de Beleidsplan 2020 – 2025**
   Esperantlingve: 'Strategia plano'.
   Ĉi tiu Strategia plano estas necesa por la imposto.
   Twan: faru pli entuziasmigan strategian planon.
   Loes: nun mankas estraranoj por efektivigi eĉ modestan planon. Venontjare finiĝos la deĵorperiodo de pluraj estraranoj. Ne venis sinproponoj.
   Foppe-Klaas: la strategia plano estas sufiĉe bona por minimuma estraro.

Bert: la plano estas direktilo. Jam multo okazas. Serĉu volontulojn por diversaj punktoj en la plano.
An: mi konsentas kun Bert. Serĉu respondeculojn, eble iu ne-estrarano povos serĉi volontulojn.
Loes: Dum la venonta estrarkunsido la estraro plikonkretigos la punktojn de la plano per aldono de personoj ligitaj al certaj punktoj.

7. **Elektoj**
   **7.1. Arbitracia komisiono**
   La arbitracia komisiono konsistas el Johan Swenker (2017-2020) kaj Marc van Oostendorp (2017-2020), kiuj ambaŭ estas reelekteblaj. Tria membro estas Anneke Schouten-Buijs (ĝis 2022). Johan kaj Marc estis reelektitaj.
   Rezerva persono estos Ralph Schmeits.

8. **Agadraporto pri 2020 (publikigita en Fenikso 2021/3)**
   Demando: de kie venas novaj membroj? Ineke: gravaj fontoj estas la studsemajnfinoj kaj homoj kiuj petis informojn, sed ofte estas nekonate.
   Unu nova membro el suda Limburgo prezentis sin kaj diris ke li komencis lerni Esperanton dum la kronvirusa tempo. Li estas politike maldekstra kaj antaŭe jam simpatiis kun la laborista movado.
   Li estas tre bonvena.
   Pri la Biblioteko de Universitato de Amsterdamo: la kompleta serio de Ludovikito estas en la biblioteko. Po 100 eŭroj estas buĝetitaj por la jaroj 2021 kaj 2022, prefere por aĉeti librojn el la serio Okcidento-Oriento. Ans, Loes kaj Federico aranĝas la aĉetadon de libroj por la biblioteko.
   Demando: Kio estas la politiko de Esperanto Nederland pri privateco? Respondo: ĝi estas publikigita en la retejo.
   Pri instruado: NGGE aktivas; ĝi kolektas informojn pri instruado.
   Pri la retejo: la retejo de Esperanto Nederland estas bone vizitata.
   La agadraporto estis aprobita.

9. **Propono**
   **9.1.Kotizo: Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2022. La estraro proponas ne ŝanĝi la kotizojn**
   La kotizoj restos senŝanĝaj.
   **9.2.Eŭropa Esperanto Unio (EEU) – la estraro pripensas ne plu esti membro de la EEU**
   Ĉar estas malklare kion EEU faras. Iu landa asocio jam malaliĝis. Foppe-Klaas: nun skribu al ĝi kaj eble poste EN realiĝu. La malaliĝo estis aprobita kun 1 sindeteno. Eble poste Esperanto Nederland realiĝos. Do, en 2022 nia asocio ne pagos la kotizon de 300 eŭroj.
   Alfonso: ĉu tia Eŭropa agado fakte ankaŭ okazas en tiurilata komisiono de UEA?

10. **Financaj raportoj pri 2020**
    **10.1.Raporto de la kaskontrol-komisiono**
    La raporto de la komisiono konsistanta el Ronaldo Nobel kaj Simon Smits estis pozitiva: la financaj raportoj estas en ordo.
    **10.2.Rezultkonto pri 2020 kun klarigoj**
    Loes klarigis. La rezultkonto estis aprobita. La kasisto estis senŝarĝita.
    **10.3.Bilanco 31-12-2020 kun klarigoj**
    La bilanco ne estis publikigita en Fenikso 2021/3. Loes sendos ĝin poste kaj ĝi estos pritraktita en la venontjara jarkunveno.
    **10.4.Buĝeto kaj Laborplano pri 2022**
    Temas ankaŭ pri 2021. La kotizo por EEU kaj la kosto de la reprezentanto estos 0 (nuloj) en 2022.
    Demando: kio estas la strategio de Esperanto Nederland? Ĉu la kapitalo estas stabila? Respondo: dum dek jaroj la kapitalo sufiĉos. Esperanto Nederland pagas €3000 jare por la katedro en la UvA. Ĝi kostas €22 000 jare. UEA kaj diversaj landaj asocioj ankaŭ pagas. Ekde 2023 Esperanto Nederland povos ŝanĝi la pagon por la katedro. La kunveno akceptis la buĝeton kun deficito de €9000, kun unu sindeteno.
    Korine kaj la kunveno esprimis dankon al la kasisto.
    Pri Informado: ĉu estas eble uzi la sociajn komunikilojn por reklami, ekz-e en Fejsbuko?

11. **Elektoj**
    **11.1. Estraro**
    **11.1.1. Elekto de prezidanto. La prezidanto Said Baluĉi demisiis la 1-an de januaro 2021. Nova prezidanto estas serĉata.**
    Estis neniu kandidato.
    **11.1.2. Elekto de sekretario. La nuna sekretario, Ineke Emmelkamp, ne estas reelektebla. Nova sekretario estas serĉata.**
    Ineke klarigis la taskojn de sekretario. La laboro ne postulas la tutan semajnon. Foppe-Klaas kaj Korine sugestis dividi la taskojn inter pluraj personoj. Ineke ankaŭ volus kunlabori kun dua sekretario. Post iom da diskuto Ineke anoncis ke ŝi restos sekretario de 2021 dum tri jaroj. Sed ŝi serĉas kunlaboranton.
    Foppe-Klaas: ĉiu membro devas prikonsideri la problemon.
    Rob Moerbeek forlasis la kunvenon en ĉi tiu momento. La kunveno danke aplaŭdis por li.

La prezidanto diris ke la problemo ne estas solvita. Li pretas aranĝi kaj prezidi malgrandan komisionon por solvi la problemon de la estraro. Dek unu personoj anoncis sian pretecon partopreni.
Okazis voĉdono pri Ineke. La rezulto estis: 18 voĉoj por Ineke kaj unu nevalida voĉo. Do, Ineke estis elektita kiel sekretario.

**11.1.3. Eventuale – elekto de estraranoj**

**La estrarano Rob Moerbeek demisias en 2021. Li ne estas reelektebla.**

**La aliaj estraranoj estas Andries Hovinga kaj Loes Demmendaal kiuj finos sian duan periodon en 2022.**

Ĉi tiu punkto pasis sen diskuto.

**11.2.Kaskontrol-komisiono**

Por la kaskontrolo de la jaroj 2019 kaj 2020 estis Jeannette Bosse kaj Simon Smits, rezervo Ronaldo Nobel. Por la kaskontrolo de la jaro 2021 estos Simon Smits kaj Ronaldo Nobel. Peter van Noorden, kiu sin proponis, estos rezerva membro.

**12. Fenikso**

Foppe-Klaas prezentis kiel Fenikso estas farata, kio aperas en ĝi kaj kio estas ĝia celo.

**13. Informado pri diversaj temoj**

**13.1.Germana Esperanto-Kongreso en kunlaboro kun Esperanto Nederland okazos en juni 2022 en Oldenburg, Germanio.**

Ineke komunikis ke venis subvencio de Eŭropa Unio. Bert de Wit faros prezenton pri biodiverseco kaj Inge de Bruijn faros prezenton pri akvomastrumado. Ankaŭ aperos libreto kun la prelegoj.

**13.2. Eventuale informoj pri aliaj temoj**

Ineke: La 15-an de oktobro murpentraĵo de la iama Esperanto-Domo estis inaŭgurita ĉe la stacidomo Presikhaaf.
Andries invitis la membrojn viziti la sociajn komunikilojn de la asocio.
Beneluksan Kongreson en Charleroi An ĉeestis. La venonta kongreso okazos en septembro 2022 en Yper, Belgio.

**14. Jubileantoj**

Dum 75 jaroj estas membroj: S-ro C.C.L. Boerlijst el Amstelveen, kiu naskiĝis en 1927, kaj s-ino T. Schonewille-Roos, kiu naskiĝis en 1921, do estas 100jara. Ŝi ricevis florojn kaj karton. S-ro Boerlijst kaj s-ino Schonewille ricevis gratuldiplomon.
25-jaraj kaj 50-jaraj membrecoj:
Pri 2020: neniu membriĝis en 1970 aŭ 1995.
Pri 2021: Gerard Peet el Hilversum, Saskia Idzerda el Utrecht, Richard Keyzer el Heerhugowaard kaj Derk Ederveen el Oostrum aliĝis en 1996, do festis sian 25-jaran jubileon.
En 1971 neniu aliĝis, do neniu festis sian 50-jaran jubileon ĉi-jare.

**Verloren van Themaat-premio**

La premio ne estis aljuĝita por 2020 kaj 2021.

**15. Ronddemandado**

Bert de Wit: 4 personoj ĉeestis fizike la Amsterdaman Rondon pasintdimanĉe. La 24-an de oktobro estos virtuala kunveno pri la temo “Forumo de legantoj”.
Korine demandis ĉu estas novaĵoj pri UEA. Ralph respondis ke baldaŭ aperos novaĵo en Libera Folio.
Ralph dankis la teamon de Fenikso kaj Alfonson Pijnacker. Li dankis la estraron.
Li demandis ĉu la estraro konscias pri la WBTR (leĝo pri estrado kaj kontrolo de juraj personoj). Rob Groeneveld diris ke la estraro konscias pri tiu leĝo kaj prezentos proponon por ŝanĝi la statuton de la asocio.
Ineke: La Studsemajnfino okazos de la 25-a ĝis la 27-a de marto 2022.

**16. Fermo**

Je la 14:58.

*Lunteren/Zoetermeer,*
*La 17-an de januaro 2022.*

*Rob Groeneveld.*

## UEA decidis vendi la domon de la CO



La komitato de UEA per reta voĉdonado faris la finan decidon pri la proponita vendo de la domo en Nieuwe Binnenweg, kie situas al Centra Oficejo de la asocio. 37 komitatanoj voĉdonis por la vendo, 13 kontraŭis la vendon kaj 4 sin detenis.
*El Libera Folio, la 13-an de februaro*



# Agadraporto de Esperanto Nederland pri 2021

**1.Banko/kapitalo**
Esperanto Nederland havis kreskon de la kapitalo en 2021 de € 3.436. La ĉefa kialo estas la alveno de la legaco de Wim Baris kaj kelkaj aliaj donacoj.
La propra kapitalo de la asocio estis je la 31-a de decembro 2021: € 97.783
La kresko estas 3,6 % (malgraŭ la kontribuo por la katedro) de la propra kapitalo je la 31-a de decembro 2020
Raportis Loes Demmendaal

***2.1. Estraro***
La estraro konsistis en 2021 el:

- prezidanto – funkcio vakas
- Ineke Emmelkamp, sekretario, ĝis la membrokunveno en 2021. En la membrokunveno de la 16-a de oktobro denove elektita kiel sekretario (ĝis majo 2024).
- Loes Demmendaal, kasisto ĝis 2022.
- Andries Hovinga, membro ĝis 2022.
- Rob Moerbeek, membro, ĝis la membrokunveno en 2021

La estraro kunvenis 7 fojojn, pere de Zoom. Okazis multaj kontaktoj pere de retmesaĝoj kaj telefonalvokoj. Rob Groeneveld ĉeestis la estrarkunsidojn kaj faris la raportojn, Korine Cheizoo regule partoprenis en diskutoj kaj lanĉis ideojn.
Esperanto Nederland havas pagitan konton ĉe Zoom. La estraro kaj la organizantoj de la kunvenoj de la Amsterdama Rondo uzas ĝin. Bert de Wit uzas ĝin por doni interretajn kursojn.

***2.2. Privacybeleid Esperanto Nederland***
La teksto pri la politiko rilate privatecajn aferojn troviĝas en la retejo de Esperanto Nederland.

***2.3 Membrokunveno***
La 30-a ĝenerala kunveno okazis la 16-an de oktobro 2021. Pro la pandemio ĝi ne povis okazi pli frue. Ĝi fizike okazis en Partycentrum Floor en Lunteren. La asocio regalis la ĉeestantajn membrojn per lunĉo. Post la kunveno okazis prelego de Silvia Pilger pere de Zoom. Pluraj membroj restis por ĝui la vespermanĝon proprakoste.

Tuj post la membrokunveno kelkaj membroj ekhavis la ideon kunveni en eta grupo (la 'dekunuopo') por priparoli la baldaŭan estontecon de Esperanto Nederland. La plej grava demando estas kiamaniere ni solvos la problemon de manko de estraranoj. Hiddo Velsink gvidas la grupon. La 13-an de novembro ni fizike kunvenis en Utrecht, poste pere de Zoom.

***2.3.1 Membroj***
La administradon de membroj prizorgas Koos Scharroo. Li sendas bonvenigan paketon al novaj membroj, disponigas aktualan adresaron al la ekspedisto, kiu dissendas Fenikson, kaj li informas la estraron kaj redakcianojn de Fenikso pri ŝanĝoj en la membraro.

Laŭmende li havigas publikan membroliston.

| LEDENADMINISTRATIE ESPERANTO NEDERLAND 2021 | | |
|---|---|---|
| | | |
| BESTAND 1-1-2021 | 205 | |
| NIEUWE LEDEN | 22 | |
| OPZEGGINGEN | -11 | |
| OVERLEDEN | -3 | |
| **BESTAND 31-12-2021** | 213 | |
| | | |
| ***LEEFTIJDEN*** | | |
| < 30 JAAR | 8 | 3,76% |
| 30 T/M 69 JAAR | 96 | 45,07% |
| ≥70 JAAR | 106 | 49,77% |
| GEEN OPGAVE | 3 | 1,40% |

*Raportas Koos Scharroo*

**2.4. Arkivo Esperanto Nederland – Internacia Instituto pri Sociala Historio (IISG)**
Dum tiu ĉi jaro ne estis kontakoj kun la IISG.
Raportis Ans Bakker-ten Hagen

**2.5. Biblioteko Universitato de Amsterdamo**
La asocio decidis ke ĉiun jaron ni donacas valorajn librojn al la Bibilioteko, maksimume € 100,-- jare.
En 2021 ni donacis du librojn:

- Vasta vortaro Esperanto-nederlanda / Uitgebreid woordenboek Esperanto-Nederlands (PIV-ido), verkita de Petro Desmet
- Konciza etimologia vortaro, verkita de André Cherpillod.

Prof. Federico Gobbo transdonos la librojn al la estro de la biblioteko.
Raportis Ineke Emmelkamp

**2.6. Komerca Ĉambro**
La asocio estas oficiale registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Amsterdamo. La registriĝo estas senpaga.

**3.1. Kaskontrolo**
La kaskontrol-komisiono en 2021 konsistis el Simon Smits kaj Ronaldo Nobel.
Ili kontrolis la jarojn 2019 kaj 2020.
*Raportis Loes Demmendaal*

**3.2. Arbitracia komisiono**
La komisiono konsistas el Marc van Oostendorp (2017-2020), Johan Swenker (2017-2020) kaj Anneke Schouten-Buijs (2019-2022). Van Oostendorp kaj Swenker konsentis daŭrigi sian agadon dum tri jaroj.
Sed pro la pandemio ili estis reelektitaj nur en oktobro 2021. En la jaro 2021 ne necesis agi.

**3.3. Verloren van Themaatpremio**
Ni ne aljuĝis la premion por la jaro 2020.
*Raportas Loes Demmendaal*

**4. Informado**
En 2021 mi daŭrigis mian laboron por trakti informpetojn, kiuj plej ofte venis per la reto. Mi forsendis 43 kovertojn kun informmaterialo (en 2020: 65).
Esperanto Nederland posedas du grandajn starantajn informilojn. Membroj povas prunti ilin.
Kelkaj membroj petis stokon de nia informmaterialo. Esperanto Nederland ne partoprenis en budoj aŭ festivaloj pro la pandemio.
*Raportis Ineke Emmelkamp*

**5. Instruado**
La estrarano Rob Moerbeek respondecas pri tiu fako ĝis la membrokunveno de la 16ª de oktobro 2021. Vidu punkton 10. Post la membrokunveno de la 16ª de oktobro ne plu estas estrarano kiu speciale okupas sin pri instruado.

**5.1 Katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.**
La Universitata kurso de Esperanto de la akademia jaro 2020-2021 okazis rete kaj trapasis la ekzamenon 15 studentoj el la tuta mondo. Multaj el ili akceptis publikigon de siaj respektivaj sinprezentoj, kune kun la studentoj de la Universitato de Parmo, kun kiu estas longdaŭra Erasmus-interŝanĝo. La katedrulo kontribuis al diversaj virtualaj eventoj esperantistaj tra la jaro: notindas lia prezento de la agado de Esperanto Nederland en la Virtuala Kongreso, kies prezento estis pretigita kune kun la asocio. Li publikigis esplorrezultojn kiel kutime. Plendetala Jarraporto estis sendita kopie porkone al la Estraro de Esperanto Nederland je 2021-01-17
*Raportis la katedrulo prof-ro d-ro Federico Gobbo*

**5.2. Studosemajnfinoj**
Arjen-Sjoerd de Vries, Lilian van der Burgt kaj Ineke Emmelkamp estis la organizantoj.
En la jaro 2021 ni planis du studosemajnfinojn: unu en marto kaj la dua en novembro.
Pro la kronvirusa pandemio ambaŭ semajnfinoj estis nuligitaj. Pri la unua jam baldaŭ estis klare, ke ĝi ne povos okazi ĉar nia lando estis tiam en stato de strikta trudizoliĝo. Pri la dua ni estis optimismaj dum longa tempo. Ni adaptis la aranĝon al la kronvirusaj reguloj, limigis la nombron da partoprenantoj kaj anoncis devigan uzon de KOVIM-atestilo. Ni faris ĉiujn preparojn, sed pro subita rapida pligraviĝo de la pandemia situacio ni tamen devis nuligi ankaŭ ĉi tiun semajnfinon, nur kelkajn tagojn antaŭ ol ĝi okazus! Feliĉe la administrantoj de la NIVON-domo Krikkenhaar estis denove helpemaj kaj konsentis ŝovi ambaŭ datojn al la jaro 2022. Ni ne bezonis pagi nuligan koston.
Bert de Wit deklaris sin preta prizorgi retajn kursojn kiel anstataŭaĵon por la fizika studosemajnfino. Parto de la aliĝintoj utiligis tiun eblon.
*Raportis Arjen-Sjoerd de Vries*

**6. Fenikso**
En 2021 ni ricevis plurajn artikolojn de membroj kaj nemembroj. Pro manko de loko ni eĉ devis prokrasti publikigon de artikoloj al la postaj numeroj. Ni adiaŭis Alfonso Pijnacker kiel verkiston de Revuo-Interŝanĝo. Benata Hengstmengel-Koopmans, kiel la posteulo de Alfonso, verkis sian unuan numeron de Revuo-interŝanĝo en 2022.
Fiksaj rubrikoj en Fenikso estis la ĉefa artikolo, en kiu ĉiufoje membro aŭ membroj rakontas sian historion. Vortserĉenigmo, preparita de Frank van Hertrooij, kaj la rubrikoj Bonvenon kaj Senpagaj libroj, verkitaj de Ineke Emmelkamp. Arjen-Sjoerd de Vries komencis novan rubrikon, Lingva testeto. Surbaze de lingvaj demandoj legantoj povas testi sian scion pri Esperanto kaj lerni la lingvon.
Joost Franssen kaj Peter Ebenau komencis labori kiel membroj de la nova redakcia konsilio. Ili juĝis pri Fenikso kaj konsilis al la redakcio de Fenikso pri kio ili povus plibonigi.
En 2021 ni publikigis 6 plenplenajn numerojn de Fenikso. En ĉi tiuj numeroj ni montris kio okazis en- kaj eksterlande, en kiuj eventoj niaj membroj povus partopreni, kaj kiom bela estas la Esperanto-mondo, kaj pri kio ni povas fieri.
*Raportis Foppe-Klaas Hovinga kaj Andries Hovinga*

**7. Interreto**

**7.1.Retejo Esperanto Nederland**
En 2021 la retejo de Esperanto Nederland publikigis precipe novaĵojn.
Cetere okazas nenio nova sub la suno.
*Raportis la retejestro Frans Schild*

**7.2. Sociaj komunikiloj**
La sociaj komunikiloj de Esperanto konsistas el: Fejsbuka paĝo, Tvitera-konto, Jutub-kanalo kaj Telegram-aj kanaloj. Mi daŭre komunikas novaĵojn en la diversaj paĝoj kaj kanaloj. La afiŝoj de Fejsbuko kaj Tvitero estas videblaj

ankaŭ en fenestreto (plugin) en la ĉefa retpaĝo de la retejo de Esperanto Nederland. Administrantoj de la sociaj komunikiloj: Andries Hovinga kaj Joost Franssen. Kunlaboris: Ineke Emmelkamp
*Raportis Andries Hovinga*

**8. Universala Esperanto Asocio (UEA)**
Dum la jaro 2021 ni ne havas komitatanon ĉe UEA. Ni ne trovis kandidaton.

**9. Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)**
La EEU-asocio daŭrigis sian laboron dum tiu ĉi jaro. Mi regule ricevis la informilojn, kiujn mi transsendas al la estraro kaj redakcio de Fenikso.
Ne okazis kongreso. En la membrokunveno de la 16-a de oktobro 2021 la membroj decidis ne plu resti membro de la asocio EEU. Ekde la unua de januaro 2022 ni ne plu estas membro kaj ne plu pagos nian kontribuon. Mi sendis sciigon al la estraro de EEU. Ili bedaŭras la decidon, sed laŭ ilia statuto ne eblas malaliĝi. Certe estas ke ni ne plu pagas nian jaran kontribuon al la asocio.
*Raportis Ineke Emmelkamp*

**10. Faka sekcio NGGE - Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantistaj.**
Pro la pandemio NGGE ne povas fari sian programon en 2021.

**11. Regionaj sekcioj**

**11.1 Sekcio Alkmaar**
La estraro konsistas el:
S-ino Tiny Droge, prezidanto, demisios en 2023. S-ino Margot Koopmans, vic-prezidanto, demisiis 2021, sed estis re-elektebla. Nun ŝi demisios en 2024. S-ro John Droge, kasisto, demisios en 2022. La estraro kunvenis 5 fojojn.
Ni kunvenis en la kvartaldomo de Alkenhorst. Averaĝe partoprenas: 12 personoj.
La nombro da membroj je la 31-a de decembro 2020: 20.
Klubkunvenoj: Unu en septembro kaj unu en oktobro. Ni nuligis la kunvenojn ĝis la fino de la jaro pro la korona pandemio.
Nia ĥoro Malvo konsistas el 10 membroj, inkluzive la dirigentinon Marijke Lathouwers.
La kluba bulteno, Fromaĝokloŝo, aperis 3 fojojn, prizorgita de Vinus Lathouwers.
Ni sendis nian klubrevuon " Fromaĝokloŝo" al nova membro kaj eksterlande al niaj ĝemelurbkluboj.
*Raportis Tiny Droge kaj Margot Koopmans*

**11.2 Esperanto Klubo Eindhoven**
Nia klubo havas 12 membrojn, el kiuj kutime 6-8 membroj venas al la kunvenoj.
Pro la konata kialo, ni ne kunvenis dum la unua duono de la jaro. Nur kelkajn fojojn ni kunvenis poste. Ni sidis kun granda distanco inter ni.
En septembro ni parolis pri tio kion ni faris la lastan jaron kaj kiel ni spertis la KOVIM-krizon.
Tiuj kiuj feriis, rakontis kion ili faris alie ol en antaŭaj jaroj.
En oktobro Rob Keetlaer rakontis pri sia pasio por ludoj en Esperanto. En novembro ni parolis pri niaj memoroj dum la junaĝo. Kion oni manĝis, kion ni faris dimanĉe.
*Raportis An Olijslagers*

**11.3 Sekcio Noord-Nederland**
La 31-an de decembro 2021 ni havis 25 membrojn, inkluzive unu honoran membron, nome sinjorino Wil van Ganswijk. La prezidanto/sekretario de la klubo estas Ineke Emmelkamp. Richard Hofman prizorgas la financojn. Johan Swenker pretas daŭrigi la organizadon de informbudoj, sed en 2020 ne estis ebloj por havi budojn. Gonda Kruijer prizorgas la gratulservon.
Okazis nur unu fizika kunveno. Aliaj kunvenoj okazis pere de Zoom, tiel ni tamen daŭrigas niajn kontaktojn unu kun la alia.
*Raportis Ineke Emmelkamp*

**11.4 Sekcio Haarlem**

La sekcio Haarlem fakte ne aktivis en la pasinta jaro pro la KOVIM-aj limigoj. Nur en septembro kunvenis kelkaj membroj ĉe Tanja van Huis, ĉar ŝi volis ke oni kontrolu la kason de la sekcio. Tion faris Rob Moerbeek kaj Ria van den Outenaar.

Cetere ne okazis kunvenoj, nur unuopaj vizitoj al Tanja aŭ al Ria. Ria sekvas per Skajpo kurson ĉe Rob Moerbeek. Ĉe Bert unufoje en ses semajnoj Zoom-as Harry kaj Wanda kaj Mariëlle kaj Jeroen.

En novembro venis ĉe Ineke peto de instruisto el Hoofddorp kiu instruas en internacia lernejo, ĉu oni povos prezenti provlecionon al lernantoj de elementa lernejo. Principe Katalin Kovats kaj Bert de Wit interkonsentis pri tio ke en januaro ili prezentos, sed pro la KOVIM-aj aranĝoj, tiu dato devis esti rekonsiderata.

Ĉar la banko nur deprenas monon de la konto de la sekcio, ni planas nuligi ĝin kaj transĝiri la restantan monon al Esperanto Nederland, kiu povos utiligi ĝin por la Amsterdama Katedro.

*Raportis Bert de Wit*

**11.5 La Amsterdama Rondo**

La kunvenoj de la Amsterdama Rondo kutime okazis en la dua dimanĉo de la monato, sed pro la KOVIM-aj limigoj precipe interrete. La kunvenoj komenciĝas je la 13-a kaj daŭras ĝis la 15-a horo. Nur unu fojon okazis kunveno en Hotelo De Koopermoolen en Warmoesstraat. Tio estis en oktobro, kiam Leston Buell instruis al ni kiel desegni kaj kolorigi belajn kartojn. Ni certe ankoraŭfoje organizos similan aktivaĵon en la estonteco, ĉar feliĉe Leston pretas prezenti tion ankoraŭfoje por pli granda publiko.

Jen la temoj de la kunvenoj :

Januaro: Ĉu novaj kontaktoj kaj novaj planoj ? Ĉiuj partoprenantoj povis paroli pri siaj planoj por 2021

Februaro: Bert de Wit prezentis kvizon: „Ĉu vere aŭ ne?“. Tiu kvizo devintus esti prezentita dum la Kultura Tago de Esperanto Nederland. Li prezentis ĝin ankoraŭfoje en la Reta Novjaro la 28-an de decembro.

Marto: Stela Besenyei-Merger pri Esperanto-familioj kaj multlingveco. Oni povas spekti tiun prezenton en Jutubo: : https://youtu.be/rrnkmRYuJug.

Aprilo: Peter Ebenau prezentis la tradukadprojekton pri tipe amsterdama libro, nome : «De Cock kaj la morto en preĝo». La projekto ankoraŭ ne estas finita fine de 2021.

Majo: La 9-an de majo, tago de Eŭropo (kaj patrina tago) la Amsterdama Rondo bonvenigis denove eksterlandan gaston : Françoise Noireau, kiu muzikis per violono kaj proponis kvizon pri mondaj muzikoj.

Junio: Leston Buell parolis pri la verkado kaj memstara eldonado de lernolibro, ĉi-kaze pri la araba lingvo.

Julio: Katalin Kovats de Edukado.net parolis el sia hejmo pri sia hobio, la farado de vitraj artaĵoj kaj montris multajn belajn objektojn!

Aŭgusto: Impresoj pri la Dua Virtuala Kongreso de Esperanto, kiu okazis inter la 17-a kaj 24-a de julio

Septembro: Ni parolis pri Feriaj Spertoj en KOVIM-a tempo.

Oktobro: Leston Buell instruis al ni kiel desegni kaj uzi akvarelpentrilojn dum kunveno en De Koopermoolen. La 24-an de oktobro okazis reta kunveno, la unua el serio «Forumo de Legantoj». Ni parolis pri artikoloj aperintaj en i.a. Ondo de Esperanto pri la demando «Ĉu Esperanto-organizaĵoj degeneras?»

Novembro: Anstataŭ je la 14-a de novembro, tuj post kunveno de Esperanto Nederland en la 13-a de novembro, ni organizis Forumon de Legantoj en la 28-a de novembro pri artikolo aperinta en Monato pri influistaj figuroj faritaj per artefarita intelekto.

Decembro: En la 12-a de decembro okazis Forumo de Legantoj pri UNESKO KURIERO. Diskuto pri kiel oni povus pli ofte uzi la tekstojn de la revuo el interreto. Ni diskutis pri artikolo pri konspirkredantoj de J.W. van Prooijen.

Estas interese ke la partoprenintoj en la kunvenoj retaj estas ofte el pluraj landoj. Tio signifas ke la retaj kunvenoj fakte estas internaciaj. Ili ankaŭ estas tiel anoncitaj en la kalendaro de Eventa Servo. Ankaŭ en Duolingo ili estas anoncitaj. Venas multaj reagoj de Duolingo-lernantoj, sed ofte neniu vere partoprenas la kunvenon. Ŝajne tio rilatas al la fakto ke lernantoj kiuj sin anoncis por tia evento, ricevos kromajn poentojn sen studado.

*Raportis Bert de Wit*

**12. Diversaĵoj**

**12.1 Tradukprojekto: Baantjer - De Cock en de dood in gebed**
En 2021 nia membro Peter Ebenau iniciatis la tradukon de libro, verkita de Baantjer. Temas pri la libro: De Cock en de dood in gebed. Pluraj membroj partoprenas.
La oficiala eldonejo 'De Fontein' donis al Esperanto Nederland la licencon traduki la libron en Esperanton, por la periodo de 5 jaroj (ĝis la 11a de marto 2026) tutmonde.
La kunlaborantoj kaj lingvaj kontrolistoj uzas la Zoom-abonon de Esperanto Nederland.

**12.2 Unesco**
La estraro de Universala Esperanto Asocio (UEA) lanĉis la ideon proklami la 26-an de julio oficiala tago de Esperanto. Multaj landaj asocioj de UEA kunlaboris. Esperanto Nederland sendis la proponon, tradukitan en la nederlandan lingvon, al la ĉefoficejo de Unesco en Hago.
Fine de 2021 venis la sciigo de UEA ke Unesco tro malfrue ricevis la peton por pritrakti ĝin en oficiala kunveno. UEA daŭrigos la iniciaton en venontaj jaroj.

Kompilis **Ineke Emmelkamp**, sekretario
La 20-an de januaro 2022

# BEMI-Semajno en junio 2022




Biciklista Esperantista Movado Internacia (**BEMI**) invitas ĉiujn ŝatantojn de biciklado al **la Kvara BEMI-semajno** en **Bazel** apud Antwerpen, **Belgio**.

**Datoj**: de sabato, la 11-a, ĝis dimanĉo, la 19-a de **junio 2022**

**Programo:**
Sabato estos alventago, dimanĉo forirtago. En ĉiu el la sep aliaj tagoj ni ekskursos bicikle tra la bela ebena regiono ĉirkaŭ la granda urbo Antwerpen. Ni planas ekskursojn je diversaj distancoj kaj gradoj de malfacileco, tiel ke la partopreno estu inda kaj por tiuj, kiuj preferas ĝui facilajn biciklopromenojn, kaj por tiuj, kiuj ŝatas sportajn defiojn. Eventuale ni formos du grupojn kiuj jen ekskursos kune, jen aparte.
El la preparitaj ekskursoj ni elektos surloke laŭ vetero.
Ni zorgos mem pri niaj manĝoj, tial ankaŭ komuna preparado, kuirado, lavado, purigado ktp. estos parto de la programo.
Kaj ni ĝojus se vi en la vesperoj rakontus aŭ prelegus pri viaj biciklovojaĝoj, pri biciklaj kondiĉoj en via lando, pri trafika politiko aŭ aliaj biciklorilataj temoj.

**Loĝado:**
Ni loĝos en propraj tendoj en la ĝardeno de la familio van den Bosch/Strug.
Bonvolu indiki en via aliĝo, ĉu vi venos kun propra tendo, kaj kiom da lokoj estas eventuale liberaj en ĝi; aŭ ĉu vi bezonos lokon en tendo de alia partoprenanto.
La familio permesas al ni uzi en ilia domo necesejon, duŝejon kaj kuirejon.
Se vi havas demandojn pri la loĝado, kontaktu la lokan organizanton Eddy van den Bosch: eddyvdbosch@gmail.com.

Por pli da informoj, i.a. pri la kostoj, kaj por aliĝi, iru al: https://bemi.tejo.org/semajno.

BEMI estas la Biciklista Esperantista Movado Internacia: grupo de esperantistoj, kiuj biciklas iomete pli ofte kaj serioze ol la averaĝa internaciulo. BEMI celas aranĝi almenaŭ unu internacian biciklo-karavanon ĉiujare, sed ankaŭ servas kiel kontaktilo por tiuj biciklistaj esperantistoj, kiuj preferas unuope vojaĝi.



# Vera Tuinder

Heerhugowaard, 1 majo 1935 – 27 januaro 2022

Divera Susanna (Vera) Tuinder-Dekker estis konata en Esperantujo ĉefe kiel la edzino de la fondinto de "Evidente" (por helpo al la plej malriĉaj vidhandikapitoj dise en la mondo) Jacques, kun kiu ŝi havis du filojn Flip kaj Jef. Ŝi mem laboris kiel "distrikta flegistino" (supozeble "wijkverpleegster") sed havis vastan interesokampon. Vigle kaj inteligente ŝi partoprenis interalie la kunvenojn de "Kritikema Komunumo IJmond", pri kio aparte menciis ŝiajn elokventajn vortojn kaj rigardon la pastro kiu parolis fine de la funebra ceremonio la 2-an de februaro. Ĉeestis ankaŭ Madzy v.d. Kooij kaj Gerrit Berveling kaj la bevervejka samideano Kees de Boer, fine pensiita, kun Bernadette. Evidente la filoj bone uzas la internacian lingvon kaj almenaŭ unu nepo ankaŭ montris intereson.
Kun Jacques, Vera partoprenis multajn Esperanto-kongresojn. En Heemskerk ŝi ankaŭ gastigadis nian "Stelrondon" kaj verve partoprenis interalie tradukadon de "Jip kaj Janneke". En la loĝoĉambro, krom multaj libroj ni vidis tutan serion da elefantofiguretoj, evidente ŝia ŝatbesto.

Plej impresis min, post telefonvoko de Jef, ke ŝi suferis cerban sangadon kaj kuŝas en komata stato en la Ruĝa-kruca malsanulejo de Beverwijk, ŝi reagas al mia voĉo. Mi trovis ambaŭ filojn ĉe ŝia lito kaj ni parolis interalie pri ŝia gastigado al la klubeto. Sed mi aparte aprezis ŝian jogo-lecionon prezentitan en semajnfino de Nosobe. Neforgeseble. Fine mi rimarkis ŝian regulan spiradon, kvankam la ŝrumpinta stato de la korpo komprenigis ke ne restas espero. Mi rekte alparolis ŝin: "Vera, mi ne donas al vi la manon, ĉar mi piediris en malvarmo." Ne tute konforme al la cirkonstanco. Tamen jen, ŝi malfermetas la buŝon kaj faras lipmovojn. Kvazaŭ adiaŭe.
Poste mi skribis al Jef, ke sub la suno nenio estas perfekta, eĉ ne komato.

Sed denove ni konsciis, ke "senkonscia" homo povas – foje – tre bone aŭdi kion diras apuduloj.
Pri tia esperantistino mi scias nenion krom bonon.
Kondolencon al ĉiuj ŝiaj parencoj kaj konatoj!

*Rob Moerbeek*

---



# Jaap Wieringa

(1925-2021)

**La 20-an de oktobro forpasis Jaap Wieringa en la aĝo de 96 jaroj.**

Jaap naskiĝis en la vilaĝo Noordhorn en la nordnederlanda provinco Groningen. Jam junaĝe li blindiĝis pro glaŭkomo kaj pro malfiksiĝo de la retino. En blindul-instituto li lernis legi per la brajla skribo. Profesie li fariĝis telefonisto en oficejo de la ŝtata imposta instanco Belastingdienst en la urbo Groningen. Tiun ĉi laboron li faris ĝis sia pensiiĝo. Jam junaĝe li eklernis Esperanton. La Internacia Lingvo ludis gravan rolon en la vivo de Jaap. Li multe korespondis kun homoj kiuj loĝis aliflanke de la Fera Kurteno en la periodo de la Malvarma Milito. Pere de tiu intensa korespondado Jaap akiris multajn sonmaterialojn el Orienta Eŭropo. Plurfoje li aŭdigis elektojn el tiuj materialoj en Nosobe-semajnfino.

Teme pri Nosobe dirindas ke ĉi tiu societo estis tre kara al Jaap. Li eĉ konis la Nosobe-fondinton Rafel Israëls persone. En 1962 li fariĝis la redaktoro de 'La Kontakto' laŭ peto de Rafel Israëls. Tiun ĉi funkcion li plenumis ĝis 2018. Alian funkcion kiun Jaap ĝis tre altaĝe plenumis, estas la funkcio de kasisto. Dum multaj jardekoj li adekvate prizorgis la financojn de Nosobe. Ĉiujare, proksimume du monatojn antaŭ la jarkunveno, Jaap cirkuligis klaran financan superrigardon inter la estraranoj. Sur la kovrilo de ĉiu poŝtaĵo kiun Jaap sendis, li konsekvence


en brajlo skribis 'J. Wieringa, Zuidhorn'. Pro sia tre longjara, sindediĉa laboro por Nosobe Jaap ricevis la reĝan honorigon 'Membro en la Ordeno de Oranje-Nassau'. La 2-an de oktobro 2021 Nosobe deklaris Jaap Honora Membro. Nur dum 18 tagoj li povis ĝui tiun ĉi honorigon. Per Jaap Nosobe perdis mildkarakteran, rakonteman personon, kiu daŭre lasis nin kunĝui pri sia esperantista vivo.

Jaap estis kremaciita en la urbo Groningen la 26-an de novembro 2021. Ni malhavos lin.

*Jan Bemelmans*
*Transprenita kun permeso el La Kontakto, N-ro 3 - aŭtuno/vintro 2021.*

# Simo Milojević

Kunja Glavica 14 decembro 1936 - 3 februaro 2022



Universala Esperanto-Asocio funebras sian eksan Ĝeneralan Direktoron Simo Milojević, kiu forpasis la 3-an de februaro 2022 en la aĝo de 85 jaroj en Trebinje (Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino). Li naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje. Milojevic studis komparan literaturon en Beogrado kaj fariĝis ĵurnalisto.

Li esperantistiĝis fine de 1956. Sian "Esperanto-karieron" li ekis kiel surloka aganto. Poste li fariĝis sekretario de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de "Jugoslavia esperantisto", poste de "La suda stelo" (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton.

Milojević redaktis la revuon "Kontakto" (1970-74). Li eklaboris en la Centra Oficejo komence de 1974. Inter 1974 ĝis 1980 li estis vicdirektoro; inter 1974 ĝis 1984 redaktoro de "Esperanto". Li fariĝis Ĝenerala Direktoro de UEA en 1983, posteno kiun li okupis ĝis 1995. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, do en 1996, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj laboris kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA.

Dum tri jardekoj, li estis unu el la ĉefaj motoroj de UEA kaj Universalaj Kongresoj. Li pensiiĝis fine de 2002. En 2006 li ricevis la "esperantistan pacpremion" Deguĉi. Li translokiĝis al Trebinje en 2007. En 2008 la Komitato de UEA, dum la UK en Roterdamo, elektis s-ron Simo Milojević kiel Honoran Membron de UEA!
UEA perdas eminentan Esperantiston, CO-kunlaborantoj ankaŭ bonan kolegon kaj amikon.*

La estraro kaj membroj de Esperanto Nederland sincere kondolencas la parencojn.

* El: Gazetaraj Komunikoj de UEA, nr. 1015 / 4 febr. 2022.

# Marian Nesse

Akordionistino kaj kantistino de Kajto kaj Kapriol'!



Ni tre bedaŭras transdoni al vi jenan tre malĝojigan mesaĝon ....
Nia karega (muzik-) amikino Marian jam delonge batalis kontraŭ kancero, kaj bedaŭrindege ŝi mortis pasintan mardon (8/02/2022) pro kancero de pankreato ...

Ni ĉiuj estas tre ĉagrenitaj ...

*Kun koraj salutoj, Nanne,Ankie kaj la teamo de EUROKKA*

# Oproep: Stuur een kaart of brief naar een euro-parlementariër!



**Waarom zou ik dat moeten doen vraag je je nu misschien af. Wel, neem even 5 minuutjes om onderstaande te lezen en doe mee!**

De Conferentie over de toekomst van Europa is een gezamenlijk initiatief van het Europees Parlement, de Raad en de Commissie waarbij Europese burgers hun mening kunnen geven over de toekomst van Europa via een reeks debatten en discussies. Die 3 instellingen zullen naar de burgers luisteren en aan de slag gaan met de aanbevelingen van de Conferentie die onder hun bevoegdheid vallen. Alle burgers konden een voorstel indienen en op hun favoriete voorstel stemmen.

UEA (Universala Esperanto Asocio) steunt hiervan enkele voorstellen die met Esperanto te maken hebben: de erkenning van het Esperanto als officiële Europese taal, het gebruik van Esperanto binnen de Europese Unie en de introductie van het Esperanto als volwaardig vak in de scholen. Tot nu toe heeft het project “The EU needs improved language learning”, van Seán Ó Riain de meeste stemmen binnengehaald. Dit project ondersteunt het sneller leren van een vreemde taal met behulp van Esperanto. Zie ook op internet: https://mallonge.net/eu23893
De campagne is nu in de tweede fase, waarin de Europese parlementariërs het beste voorstel kiezen. Daarom vragen we jou om hen een persoonlijke kaart of brief te schrijven en steun te vragen voor dit project. Hieronder vind je een voorbeeld en de gegevens.

Schrijf op de achterkant:

*Zorg voor elkaar!*

Conferentie over de toekomst van Europa.

Omdat we in Europa zoveel verschillende talen hebben, vind ik het belangrijk dat de burgers goed taalonderwijs krijgen. Daarom vraag ik u om het meest gesteunde voorstel te steunen:

Een veel beter taalonderwijs in Europa (zie https://mallonge.net/eu23893).

‹Jouw naam, adres en handtekening›




Plak deze zegel: Internationaal 0 - 20 gram

Europees Parlement
‹Naam›
Wiertzstraat 60
B-1047 Brussel (België)

Kies een naam uit deze lijst:

- Mevr. Roelien Kamminga (Europa in de wereld)
- De heer Sjoerd Sjoerdsma (Waarden, Rechten, Veiligheid)
- De heer Bastiaan van Apeldoorn (Europese democratie)
- Mevr. Ymare Van der Sluis (Europa in de wereld)
- De heer Wepke Kingma (Europese democratie)

Voor meer namen kijk op: https://mallonge.net/2202parl

Een voorbeeld-kaart: https://mallonge.net/2202vbkaart
Een voorbeeld-brief: https://mallonge.net/2202vbbrief
De campagne van de UEA: https://mallonge.net/2202ueacampagne

*An Olijslagers*

# Vortserĉenigmo

**La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas Bakado.**

Solvo de la lasta vortserĉenigmo estas:
**"En arbaro arbo ĉiam havas amikojn."**

Venis kelkaj bonaj solvoj! Mi disdonas tri premiojn: al Gerard, Kees kaj Frank. Ĉiuj ricevas kompaktdiskon!

Nun mi ne plu havas kompaktdiskojn. Nun mankas donacoj. Certe vi povas solvi la enigmojn, kiuj aperos en la venontaj Feniksoj, sed ne plu estas premioj!
Nur por via propra plezuro vi solvu la enigmojn!
*Kun amikaj salutoj,*
*Ineke Emmelkamp*

*Kreita de Frank van Hertrooij*

| | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| M | I | K | S | I | V | A | F | L | O | Ĉ | F | U | V | I |
| O | L | E | M | A | R | A | K | H | P | R | A | I | V | A |
| S | S | R | O | R | E | T | U | B | U | A | D | E | C | E |
| A | P | K | M | T | O | N | F | K | P | E | N | A | P | G |
| F | K | O | E | A | R | I | T | E | N | A | M | E | U | T |
| A | R | V | P | K | L | O | K | K | S | A | S | S | R | K |
| S | L | A | O | U | J | S | M | A | N | T | T | T | Ĉ | O |
| U | A | I | N | O | D | A | A | D | B | U | O | F | O | N |
| K | I | L | N | D | K | I | O | T | M | U | L | A | K | F |
| E | B | O | O | A | A | U | N | I | A | A | E | R | O | I |
| R | N | A | R | Ĉ | V | T | K | G | K | F | N | U | L | T |
| A | R | O | L | O | I | S | O | T | O | A | R | N | A | A |
| Ĵ | N | O | R | S | U | K | O | R | A | E | O | O | D | Ĵ |
| O | D | E | N | U | K | S | O | J | T | P | F | R | A | O |
| P | B | A | O | M | E | R | K | N | O | O | J | O | V | O |

Frazo:

| | | |
|---|---|---|
| Akvo | Fruktoj | Nuksoj |
| Amando | Gustumi | Ovoj |
| Baki | Karamelo | Panero |
| Bero | Kekso | Pasto |
| Butero | Knedi | Patkuko |
| Ĉokolada | Konfitaĵo | Pudingo |
| Dolĉa | Kremo | Salo |
| Faruno | Lakto | Sukeraĵo |
| Festo | Makarono | Torto |
| Fornelo | Malsata | Vaflo |
| Franda | Miksi | Vanila |

Foto: Canva

# 73-a IFEF-kongreso 2022 en Ĉeĥa Respubliko



La 73-a IFEF-kongreso okazos en Ĉeĥio, en **urbo Beroun**, proksime de Prago, **de la 6-a ĝis la 11-a de majo 2022**.

**Bonvenon en la Ĉeĥa Respubliko!**

Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio r.s. (ĈeFEA) kaj Ĉeĥa Landa Asocio de FISAIC (ĈLA FISAIC) tutkore invitas vin al la 73-a IFEF-kongreso 2022 en Beroun. Urbo Beroun kun sia riĉa historio troviĝas en Meza Bohemio, 35 kilometrojn okcidente de Prago, facile atingebla per trajno aŭ aŭtomobilo.

Ni, organizantoj de la kongreso, estas ĝojaj, ke per la kongreso en Beroun ni povas daŭrigi tradicion de organizado de IFEF-kongresoj en la Ĉeĥa Respubliko (1991 - 43-a IFK Olomouc, 2001 - 53-a IFK Tabor kaj 2011 - 63-a IFK Liberec) kaj disponigi al vi agrablan medion por restado kaj kongresa traktado. La hotelo Grand en Beroun, kiu gastigos nin dum la kongresa semajno estas taŭge ekipita por similaj aranĝoj, kie vi povos ĝui ĉiujn programerojn, loĝadon kaj manĝojn en la sama loko.



Samtempe ni volas prezenti al vi belan regionon de Meza Bohemio kun ĝiaj riĉaj naturaj kaj historiaj interesaĵoj. Dum kulturaj programeroj vi povos plene ĝui bonkvalitajn kaj interesajn prezentojn de lokaj artistoj kaj muzikistoj.
Ni esperas, ke la kongreso en Beroun ne trompos viajn atendojn, kaj ke vi rememoros ĝin en viaj kapoj kaj koroj dum multaj jaroj.
Por pli da informoj, iru al: https://mallonge.net/IFEF

**Estu kore bonvenigataj en la 73-a IFEF-kongreso en Beroun.**

Hiernaast een column in de NRC van zaterdag 4 en zondag 5 december 2021




El la Jutuba filmeto: "Sendu al mi la ligilon - Esperanto", 3-minuta terapio per ridetoj, sendita de Gerrit Berveling: https://mallonge.net/tmtr



COLUMN

Ben Tiggelaar

## 'Slecht Engels' is de wereldtaal

Is het volgende herkenbaar? Wanneer ik voor mijn werk met Britten overleg, ben ik vooraf altijd wat gespannen vanwege de taal. En na afloop ben ik ook vermoeider dan na andere gesprekken. Maar als ik een gesprek in het Engels moet voeren met een groep Spanjaarden, Chinezen of Duitsers, heb ik daar totaal geen last van. Ik denk dan niet na over dingen als vocabulaire, grammatica of uitspraak, maar ben gewoon lekker bezig met mijn werk.

In het internationale verkeer spreken de meeste mensen heel goed *bad English*. De grap komt van Heather Hansen, communicatiespecialist en taalcoach. En volgens haar is mijn ervaring heel normaal. Mensen die Engels als tweede taal hebben, voeren met elkaar veel comfortabeler conversaties dan met mensen van wie Engels de moedertaal is.

Niet *the Queen's English*, maar slecht Engels is dus de lingua franca van de zakenwereld. Wereldwijd spreken - de schattingen verschillen - 1,5 miljard tot 2 miljard mensen Engels. Het aantal mensen dat Engels als tweede taal spreekt, is veel groter dan het aantal *native speakers*. Dat ligt op circa 370 miljoen. Alleen al in China zijn er meer mensen die nu Engels leren.

## Roterdamo esperantumas!

**Renkontiĝo de lokaj gesamideanoj.**
**Ni reekagadas en la administra kerno de Esperantujo!**

Salutooooon!

Ĉiu-ĵaŭde je la 19-a horo unu el Roterdamaj TEJO-volontuloj atendas vin en Centra Oficejo ĉe Nieuwe Binnenweg 176. Ne hezitu, venu kaj ni babilu/amuziĝu/agadu kune!

La renkontiĝo estas por ĉiuj, sendepende de lingvonivelo. Tiuj, kiuj nule scias pri kaj ne komprenas Esperanton, estos enkondukitaj kaj instruataj (angle).
Ĉio en malstreĉa, neformala etoso - ni provizas kafon aŭ teon, spacon kaj alian subtenon de UEA/TEJO laŭbezone.
Nepre informu konatajn Roterdamanojn kaj aliulojn de la ĉirkauaj komunumoj!
[KOVIM-19] Ni zorgas unu pri la alia - por ĉeesti vakcinatestiloj estas devigaj!

Do, ĝis baldaŭ, ĉu ne?
*Informo:*
*wojciech.oreszczuk(ĉe)gmail.com*

## Respondoj de la Lingva testeto

**Jen la respondoj de la lingva testeto de paĝo 7.**

**Respondo de demando 1: c.**




Pasiono estas oratorio pri la suferoj de Kristo.
Famaj ekzemploj estas la Johano-Pasiono kaj Mateo-Pasiono de Bach. Pasio estas forta entuziasmo aŭ amo (nederlande: *passie, hartstocht*).

**Respondo de demando 2: c.**

La ĝusta frazo estas: *Ĉu vi opinias amon plej grava en la vivo?* Uzu la adjektivon grava ĉar la vorto priskribas la substantivon amon. Laŭ fraz-analizo ĝi estas "rekta predikativo de la objekto" (nederlande: *bepaling van gesteldheid*).

Por pli funda klarigo, vidu paragrafojn 3.7 kaj 5.8 en *Esperanto – Grammatica met oefeningen.*

*Arjen-Sjoerd de Vries*

*Bildo: Vikipedio*

## Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we alleen in goed overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op.
Stuur je bijdrage op naar: redakcio@esperanto-nederland.nl.

### Ekzistas diversaj radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto

3ZZZ Radio
Ĉina Radio Internacia
Radio Frei
Kernpunkto

Muzaiko
Radio Havana Kubo
Varsovia Vento
Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:
- aŭskulti rete: http://esperanto-radio.com
- aŭskulti per apo (nur Android): Muzaiko

Esperanto-radio Muzaiko

Eventueel retouradres: Esperanto Nederland Ledenadministratie, Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord

ESPERANTO NEDERLAND

# Studieweekenden in 2022
# Germana Esperanto-Kongreso

**25, 26 en 27 maart 2022**
Meer dan twee jaar hebben de studieweekenden van Esperanto Nederland stilgelegen. Als organisatie hebben we ze erg gemist! Het eerstvolgende weekend is nu gepland op 25, 26 en 27 maart 2022. Maar het is nog steeds niet helemaal zeker of het door kan gaan. We gaan in ieder geval een kleinere bijeenkomst organiseren. Minder deelnemers en daardoor is er meer ruimte in de slaapkamers, de lesruimten en eetzaal. Meld je snel aan, want vol=vol. Mail of bel me voor de zekerheid even!

**14, 15 en 16 oktober 2022**
In eerste instantie was het studieweekend gepland in november 2022. Gelukkig kunnen we de bijeenkomst eerder organiseren. We kunnen nu terecht op 14, 15 en 16 oktober 2022. We hopen uiteraard dat de corona-perikelen dan voorbij zijn. Het liefste willen we dan weer een studieweekend zoals we het gewend zijn: een huis vol Esperanto-studerenden, lessen op vijf niveaus, lekker eten en veel gezelligheid. Aanmelden voor deze bijeenkomst kan na 1 april 2022. Het nieuwe aanmeldingsformulier staat dan op de website vermeld. Meer informatie staat op de website:  https://mallonge.net/2202stsmf

**Germana Esperanto-Kongreso 3 – 6 juni 2022**  https://mallonge.net/2202gek2022
Tijdens de Pinksterdagen vindt in Oldenburg ( Oldb) in Noord-Duitsland het Duitse Esperanto-congres plaats, in samenwerking met Esperanto Nederland. Het thema van deze bijeenkomst is: 'Duurzaamheid'. Er zullen verschillende lezingen zijn. Er is een cursus 'vliegers maken en daarna oplaten'. Er is een groep die gaat zingen! Abunda programo!

Er is ook een Esperanto-cursus voor beginners gepland. Deze cursus wordt gegeven door Federico Gobbo (Universiteit van Amsterdam).

Er is ook een speciale bijeenkomst voor jongeren 'Kekso'. Ook zij organiseren een beginnerscursus! https://mallonge.net/2202kekso

Ik denk dat dit interessante en leuke bijeenkomsten zijn. Ook voor mensen die nog niet zo vaak naar een bijeenkomst in het buitenland zijn geweest. Je kunt dus nu Esperanto gaan gebruiken tijdens een internationale bijeenkomst. Weet je het nog niet zeker of je wilt gaan? Heb je hier nog vragen over? Neem dan contact met me op.

*Ineke Emmelkamp,*
*Studosemajnfino@esperanto-nederland.nl  tel. 050 – 5718842*

**Fenikso**
27a jarkolekto, n-r 2
marto - aprilo 2022

PostNL
Port betaald
Port payé
Pays-Bas